

La Riverego

NASK en Kanado !	2	La ĉiela kastelo	8
Stipendioj por NASK	3	La paco eblas !	14
AMO-seminario en Kanado	3	Eventoj en Ukrainio	20
Uson-Kanada Landa Kongreso	3	La Idoj de la Suno	27
Esperanto en teatraĵo	6	E-aranĝoj	36



La ĉiela kastelo
Le château céleste

NASK-2014 en Kanado ? Jes !!!



Le NASK – le fameux cours d’été d’espéranto, cette année aura lieu, pour la première fois, au Canada, sur le beau campus de l’Université de Victoria en Colombie-Britannique.

La unuan fojon en sia 45-jara historio, NASK — la fama Nord-Amerika Somera Kursaro — okazos ekster Usono. La bela kampuso de la Universitato de Viktorio (Brita Kolumbio, Kanado) en la pitoreska Gordon Head fariĝos hejmo por la mallonga intensa kursaro de Esperanto. Nur 20 minutojn de la urbocentro de Viktorio, kun flughaveno kaj pramhaveno, promendistance de la parko Gyro kaj la akvo, la Universitato de Viktorio estas ideala loko por la kursaro. Alvenu la 29-an de junio kaj foriru la 8-an de julio por ok tagoj da lernado, amuziĝo kaj esplorado de la bonegaj muzeoj, historiaj konstruaĵoj, variaj restoracioj kaj vendejoj — kaj ĉio ĉi ene de mallonga busveturo de la kampuso!

« Tiuj, kiuj ĉeestas NASK unuafoje tuj rimarkas, ke la etoso estas tre speciala. La kursaro kutime okazas en belega loko, kaj ĉi-jare en Viktorio tute ne estos escepto — ĝi estas rave bela », rimarkis

Grant Goodall, prezidanto de ESF. Pro la elektita loko, la organizantoj esperas, ke NASK estos eĉ pli internacia ol kutime : « Venos studentoj el Azio, Norda kaj Suda Ameriko, Eŭropo, kaj verŝajne Afriko, por lerni de profesoroj el tri kontinentoj », diris Derek Roff, ESF-estrarano. « Renoma verkisto kaj movada aktivulo István Ertl el Hungario/ Eŭropo instruos en la supera nivelo. Usui Hiroyuki el Japanio/Ĉinio/Azio, nun redaktoro de la Esperanto-Sekcio de *El Popola Ĉinio*, progresigos la progresantan kurson, kaj Ĵenja Bondelid el Usono/Nordameriko, iama studento ĉe NASK kaj specialisto pri instruado, dancado kaj teatro, instruos la post-bazan nivelon ». Se vi jam faris kurson por komencantoj, vi estos preta por la postbaza grupo ĉe NASK. Se vi ne jam faris tian kurson, restas tempo ! Ekzemple, vi povas iri al www.lernu.net kaj fari la kurson por komencantoj, « Ana Pana », rekomendas Lee Miller, NASK-kunorganizanto.

Kompreneble, aldone al la studado, la partoprenantoj ĝuos riĉan amuzan programon : ekskursoj, ludoj, filmoj kaj... ĉiam multe da babilado : ja malsimile al grandaj renkontiĝoj kiel la UK, en NASK oni vere konatiĝas kun la aliaj kaj interŝanĝas ideojn kaj perspektivojn. Hoss Firooznia, respondeca pri eksterstudaj aktivaĵoj, instigas la lernantojn gvidi mallongajn programojn pri temo el la propra fako aŭ sperto : « En 2013, ekzemple, lernantoj gvidis dancekzercon, instruis go-ludon, montris memfaritajn filmojn, parolis pri budhismo... kaj multe pli. »

La kotizo, kiu inkluzivas kursojn, loĝadon kaj matenmanĝojn, estas **475 USD** (ĝis 1a de aprilo) kaj **525 USD** post la unua de aprilo. Oni rekomendas kunporti ĉ. \$200 por tagmanĝoj kaj vespermanĝoj, kiujn oni povas aĉeti sur la kampuso aŭ en apudaj malgrandaj restoracioj. Iom da stipendioj estas haveblaj por plentempaj studentoj, instruistoj kaj loĝantoj de Latin-Ameriko.



Krome, por tiuj kiuj deziras resti kelkajn pliajn tagojn en bela Viktorio post NASK, estos kelkaj ebloj daŭre ĝui Esperantan etoson : estas planata post-NASK-a ekskurso/amuzprogramo, plus komuna UEA-ESF-Seminario por Aktivula Maturigo (AMO) la 9-10an de julio, kaj la komuna du-landa kongreso de Esperanto-USA kaj Kanada Esperanto-Asocio (KEA)

okazos la 11-14-an de julio en apuda urbo Sidney. (Se vi ŝatus resti por la kongreso, bv. aranĝi detalojn kun Esperanto-USA : e-usa@esperanto-usa.org)

Bv. turnu vin al Ellen M. Eddy, la administranto, pri ĉiuj demandoj : eddyellen@aol.com

Pliaj informoj : <http://nask.esperantic.org>

Videoj :

- [Intervjuo kun Derek Roff](#)
- [Filmeto de Fabjo Monteiro](#)

[Laŭ Esperantic.org]

Stipendioj por NASK

Por Kanadanoj, ekzistas ebleco ricevi stipendion por partopreni NASK-on. La Kanada Esperanto-Asocio havas instruan fondaĵon, pri kiu respondecas Ian Richmond, Allan Simon kaj Geoffrey Greatrex. Ĝi intencas disdoni stipendiojn al lernantoj, kiuj intencas ĉeesti NASK-on por partopreni kurson tie. Oni celas homojn, kiuj jam posedas almenaŭ ian bazan scion de Esperanto kaj kies financaj rimedoj ne permesus al ili normale veni al la aranĝo kaj pagi la kotizojn. Oni intencas disdoni proks. \$2000 en subvencioj ; la sumo donota al unuopulo dependos je la cirkonstancoj de la petanto (kie li/ŝi loĝas, ekzemple). Interesatoj bv. sendi retmesaĝon, en kiu oni pravigas sian peton kaj klare indikas la sumon petatan, al Geoffrey Greatrex, greatrex@uottawa.ca. La limdato por petoj estas la 1-a de aprilo 2014 ; la komisiono anoncos siajn decidojn antaŭ la 15-a de aprilo.

Printempaj aranĝoj

MEKARO (Ŝerbruko), 17-19-a de majo (ALIGŬ TUJ por havi lokon!)

Lingvo kaj Egaleco : Simpozio ĉe UN, Novjorko, 29-a de aprilo

Kino-Teatro-Festivalo | NOREK, 11-18-a de aprilo, Langley, Vaŝingtonio

Someraj aranĝoj

NASK, 29-a de junio — 8-a de julio, Viktorio, BK (Brita Kolumbio)

AMO : Seminario por Aktivula maturigo, 9-10-a de julio, Sidney, BK

Usona-Kanada Landa Kongreso,

Usona-Kanada Landa Kongreso-2014 okazos en Kanado !

La 62a Landa Kongreso de Esperanto-USA okazos de vendredo la 11-a de julio vespere ĝis lundo tagmeze la 14-a de julio en Sidney, Brita Kolumbio, Kanado. **Ni aparte invitas partopreni komencantojn kaj alilandanojn.**

Aliĝado, loĝado kaj aliaj informoj ĉe la retejo de Esperanto-USA : esperanto-usa.org.

Simpozio : Lingvo kaj Egaleco

Kunlabore kun la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) kaj la Universitato de Hartfordo, la Stud-grupo pri Lingvo kaj la



Unuiĝintaj Nacioj organizas simpozion pri lingvo kaj egaleco la 29-an de aprilo 2014, en la Centro Church (777 United Nations Plaza) en Novjorko. Frua aliĝo (antaŭ 29-a de aprilo) kostas \$25, kaj surloka aliĝo \$30 (senpage por UN-stabanoj, stabanoj de UN-misioj, kaj reprezentantoj de neregistaraj organizoj).

Sub la prezido de iama ESF-prezidanto D-ro Humphrey Tonkin, la simpozio prezentos antaŭan ESF-prezidanton kaj nunan UEA-prezidanton D-ron Mark Fettes kiel festparolanton kaj diskutgvidanton, kaj ankaŭ internacian aron de akademiaj prelegantoj, inter kiuj ESF-konsilantarano D-ro Esther Schor.

Por plenaj programdetaloj (angle) :
www.languageandtheun.org

UEA-Seminario Por Aktivula Maturigo — Kanado (AMO-2)

UEA gvidos seminarion pri Aktivula Maturigo en Nord-Ameriko inter NASK kaj la Landa Kongreso. La temo de la seminario : « Strategio kaj praktiko de Esperanto-informado en Norda Ameriko ». Inter la gvidantoj estos Mark Fettes (prezidanto de UEA), Humphrey Tonkin (eks-prezidanto de UEA), Orlando Raola (prezidanto de Esperanto-USA), Hoss Firooznia, Grant Goodall kaj Ĵenja Amis.

El inter la temoj : La Nord-Amerika kunteksto, Kiel paroli kaj verki pri Esperanto, La scienco persvadi (kiel intervjuigi, verki gazetaran komunikon, krei kaj redakti retpaĝojn, uzi sociajn retojn), Organizo de la informa laboro, kaj pli !

Ni esperas doni kelkajn subvenciojn al junaj partoprenantoj. Por kandidatiĝi, bonvolu sendi mesaĝon, kiu resumas vian movadan biografion kaj viajn celojn kiel aktivulo, al [mtfettes \(ĉe\) sfu.ca](mailto:mtfettes@esu.ca).

Kosto por partopreni la seminarion estas \$40. Vi povas aliĝi ĉe la retejo de Esperanto-USA. Se vi havas demandojn, sendu ilin al [eusa \(ĉe\) esperanto-usa.org](mailto:eusa@esu.ca).



Esperanto en la teatraĵo *The Language Archive* !

Ĵenja Bondelid

La teatraĵo *The Language Archive* realigita de OutCast Productions, kie « rolis » ankaŭ Esperanto, furoris en Vaŝingtonio en ĉi-februare kaj marte. Pri la bona prononco de la aktoroj zorgis Ĵenja Bondelid, la « skulptistino » el la videokurso Esperanto — Pasporto al la Tuta Mondo, kiu eĉ mem rolis en la teatraĵo. Jen ŝia artikolo pri la evento — kaj invito al ĉiuj kreemuloj al tre speciala evento, Kino-Teatro-Festivalo, en Vaŝingtonio :

www.kotofesto.org — Red.

Ĝuste nun, mi sidas malantaŭ la scenejo, aŭskultante miajn gekolegojn (ne-Esperantajn aktorojn), kiuj uzas nian lingvon, kaj mirante pri mia bonŝanco. Mi eklernis pasintsomere (fakte, dum NASK), ke Outcast Productions en Langley, Vaŝingtonio, planas prezenti *The Language Archive* de Julia Cho — belan teatraĵon, en kiu Esperanto rolas (pli ol iomete !). Mi ekpensis : kia ŝanco ! Precize kiam mi sentis min preta esti pli malferma pri mia esperantisteco antaŭ miaj « ĉiutagaj » konatoj kaj geamikoj, jen oportuno tion fari !

Mi jam laboris por Outcast kiel danckomponisto por muzika teatraĵo pri la unua mondmilito, *Oh! What a Lovely War*, kaj estis inter la rolularo. Ĉar mi tiam tre ĝuis labori kun tiel profesieca loka teatra grupo, mi hastis kontakti ilin por proponi min kiel lingvan konsiliston. (Mi konfesas, ke mi iom averte rakontis pri Incubus, por instigi ilin akcepti mian proponon.) Tamen, la reĝisoro, Ned Farley, kiu rolis kiel unu el la apostoloj en la filmo *Jesus Christ, Superstar*, ne nur bonvenigis mian helpon, sed bonkore « eltranĉis » por mi la rolon de Esperanto-instruisto, kiun kutime ludus alia

aktoro, inter siaj diversaj roloj.

La okazo utiligi Esperanton en mia teatra medio estis nekredeble bela, kaj mi aparte ŝatas tiun ĉi teatraĵon, kiu estas sammulte korŝira kiom ridiga. Kaj kia oportuno varbi loke ! Nun ĉiuj, kiuj vidis la teatraĵon, scias, kio estas Esperanto, kiu estis Zamenhof, kaj kiel sonas la lingvo. (Nu, mia rolo postulis germanan akĉenton, sed la aliaj aktoroj uzis sufiĉe internacian prononcon.)

Mi sekvigas tiun oportunon per esperant-lingva aranĝo tre bonŝance jam planita, Kino-Teatro-Festivalo, kiu okazos inter la 11-a kaj la 20-a de

aprilo. En ĝi lokanoj kaj aliaj komencantoj povos sperti baznivelajn lecionojn pri Esperanto kaj ĉiuj kune partoprenos filmfaradon, teatrumadon, kaj aliajn scenartojn cele al prezentado dum NOREK (la Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco) la 19-an de aprilo. Por pliinformiĝi pri nia programo, instruistaro, kaj aliaj detaloj pri KoToFesto, vizitu nian retpaĝon (www.kotofesto.org). Aŭ por lastatempaj ĝisdatigoj vizitu (kaj « ŝatu ») nian paĝon ĉe Facebook, titolitan « Kinoteatrofestivalo ». Venu kunĝui kreivan sperton en Esperanta medio !



Sur la fotoj : scenoj el la teatraĵo. Ĵenja Bondelid estas sur la meza foto.

La ĉiela kastelo

Ĵenja Amis



Pour les Japonais, les montagnes sont sacrées, « car c'est là qu'habitent les dieux ». En visitant les ruines du château Takeda, que l'on appelle aussi le « Machu Picchu japonais », et en voyant une « mer de nuages » au-dessous de nous, avec des montagnes comme des îles, j'ai bien compris pourquoi !

« Niaj japanaj gastigantoj estas tro bonaj kaj ni certe ne meritas ĉion, kion ili faras por ni », mi denove diras silente al mi. Tion mi faras ofte dum nia dumonata restado en Japanio. Nia trajno ekas, kaj mi mansvingas, ĝis mi ne plu povas vidi niajn amikojn, kiuj kuiris por ni, ŝoforis, ĉiĉeronis, kaj gastigis nin en la urbeto Takeda. La larmoj aperas nevole, kaj mi vidas, ke ankaŭ miaj kunvojaĝantoj, mia edzo Joel kaj amikino Malgoŝa, suspekta frotas la okulojn. Mi fermas la

okulojn kaj antaŭ mi denove aperas la nuba maro, kiu volvas la monton, la pinarbojn, la ruinojn de la antikva kastelo per sia magia lakta mantelo. Mi vidas ĝin de supre, kaj sentas, kvazaŭ mi starus sur la ĉielo kaj vidus loĝejon de dioj... Mi faras centojn da fotoj kaj provas absorbi la aeron, enspiri la nubojn kaj rimarki ĉiun etan detalon por povi ĉiam rememori tiun dutagan vojaĝon al Takeda, kiu daŭros eterne en mia koro...

Diri tion al aliaj esperantistoj ne vere estas necese, sed ne-esperantistoj ofte surpriziĝas, kiam mi diras al ili, ke Esperanto estas eble la plej utila lingvo, kiun mi iam ajn lernis. Kiam antaŭ deko da jaroj mi kun ĝojo anoncis al mia patrino, ke mi komencas lerni Esperanton, mi ricevis oblikvan rigardon kun la (certe, bonintenca !) konsilo « Ĉu eble estus pli utile pasigi vian tempon lernante la anglan ?.. ». Nun mia patrino ridas, kiam mi rememorigas pri tiu okazaĵo (« Bone, bone, mi estis malprava, vi ne devas konstante tion rememorigi... »). Sen Esperanto mi ne havus tiom da amikoj, kaj certe ne povus resti du monatojn en Japanio loĝante ĉe Japanoj, kiuj malfermis al ni ne nur siajn domojn, sed ankaŭ siajn korojn.

Estas dank' al Esperanto, ke pasintjare ni konatiĝis kun s-ro KOBABAŜI Masajuki, kiu invitis nin al sia loĝloko — la eta urbeto Takeda, kies nomo signifas « bambua kampo » kaj kiu troviĝas en la montoj de la regiono Tajima, en gubernio Hjogo. Li multe rakontis pri tiu ĉi urbo, kien li translokiĝis de Tokio antaŭ iom da jaroj, kaj



Niaj amikoj el Takeda

donacis al ni belegajn poŝtkartojn, invitante viziti, se ni denove estos en Japanio. « Ĉu vi hazarde ne laboras por la turisma oficejo de Takeda ? » ŝercis mia edzo, kaj ni solene promesis viziti ĝin, kiam ni denove venos al Japanio. Bone por ni, ke tiu ŝanco prezentiĝis baldaŭ !

La Japanoj malofte uzas siajn personajn nomojn : ili preferas uzi familinomojn kaj fine aldoni la respektan sufikson « san » — aŭ « ĉan » kiel karesan aŭ pli intiman version. Inter la amikoj Kobabaŝi estas konata kiel Koba-ĉan. Aldone, li mem elpensis alian nomon : Komo (kunigo de la inicialoj « Kobabaŝi » kaj « Masajuki »), sed tiu nomo estis tuj transformita al la nomo « Moko » fare de unu el liaj Esperanto-lernantinoj : ridema kaj ŝercema Ĵunko. « Ĉar vi, Ĵunko, mem estas mokema », diras Koba-ĉan, kompreneble, je granda amuziĝo kaj ĝoja rido de Ĵunko. Koba-ĉan estas ĝentila, afabla kaj ŝercema, tamen, tute ne mokema. Li ne naskiĝis en Takeda, sed en Tokio — tamen, al la demando, kiu estas via plej ŝatata urbo, respondas senhezite :

« Takeda ! ». Li jam vizitis kelkajn landojn kaj revas viziti la foran nordon por vidi la nordan brilon, sed tamen anstataŭ vojaĝi eksterlanden li preferas « porti la eksterlandon al si » invitante alilandanojn al Takeda, kie li laboras kiel agrikulturisto : laboro, kiu korespondas al liaj idealoj. Li multe preferas la trankvilan vivon en Takeda al sia naskiĝurbo, la rapidega kaj trafikplena Tokio. La sola afero, kiun Koba-ĉan iomete bedaŭras, estas, ke laboro de individua agrikulturisto estas iomete soleca. Tamen, ĉiusemajne li okazigas Esperanto-kurson, eĉ kun skajpumado kun esperantistoj el aliaj landoj, kiujn li invitis al Takeda. Invitante eksterlandanojn al Takeda Kobajaŝi ankaŭ iusence plenumas la profetaĵon de kunfondinto de la japana religio Oomoto, kiu iam skribis, ke homoj el ĉiuj landoj iam kolektiĝos en Takeda.

Japania Maĉupikĉuo

Kvankam la ruinoj de la kastelo staris en Takeda jam dum jarcentoj, tiu eta urbeto de ĉirkaŭ mil familioj famiĝis nur antaŭ sufiĉe nelonge, post serio de japanaj televidprogramoj pri la Takeda-kastelo. Oni nomas tiun lokon « Japania Maĉupikĉuo », ĉar tie, same kiel en Maĉupikĉuo, oni povas vidi — se oni estas bonŝancaj — la nubojn de supre ! Se antaŭe oni povis grimpi la

ruinojn libere kaj senpage, kun la populariĝo de tiu ĉi loko oni konstruis turisman oficejon kaj eĉ enkondukis la pagon de 300 enoj (ĉ. 3 dolaroj) por eniri la ruinojn. Tamen, eĉ se japanaj turistoj multas (ofte multas ĝis tiu grado, ke ne eblas trovi liberan parklokon mezmatene), la loko ne estas konata eksterlande, kaj turismaj broŝuroj en la angla ankaŭ ne troviĝas. Unu el la kialoj estas ke ĝi estas sufiĉe malproksima de grandaj urboj kaj ne facile atingebla per trajnoj. Krome, ĝi apenaŭ havas hotelojn, kvankam antaŭnelonge unu « depato » (ĉionvendejo, de la angla « department store ») konvertiĝis al malmultekosta hotelo, pro la alfluo de enlandaj turistoj.





Koba-ĉan petas nin vekiĝi frue, ĉar ni devas jam foriri ĉirkaŭ la 6-a matene : unue, ĉar oni povas vidi la plej belan pejzaĝon nur matene, kaj due, simple por kapti la lokon en la parkejo. Kiel ĉiuj Japanoj, li alvenas 15 minutojn pli frue ol la decidita renkontiĝa tempo kaj devas atendi nin, la okcidentanojn, por kiuj « estis preta ĉirkaŭ la 6a horo » signifas « esti preta je la 6a horo aŭ iomete poste » kaj *ne* « esti preta je la 5:45 », kiel por la Japanoj. Antaŭ ol alveni frumatene Koba-ĉan eĉ kontrolis, ĉu estas liberaj lokoj en la pli supra parkejo — la respondo estis negativa, sed tion li, fakte atendis : ja multaj homoj alvenas la antaŭan tagon kaj simple dormas en la parkejo en la aŭto, do, ne surprize, ĉiam mankas spacoj.


Suben al la nubo

La ĉielo aspektas tute griza, kiam nia grupo el ses personoj — tri ne-Japanoj kaj tri lokanoj — komencas la montogrimpadon. Krom Koba-ĉan mem, nin akompanas gesinjoroj Makoto kaj Miharu CUMOTO, niaj gastigantoj en Takeda. Ni pasigis du noktojn en iliaj ducentjara histori plena domo, kiu pli similas al muzeo ol al ordinara domo (mi notis, ke ĝi eĉ odoras kiel muzeo !) kaj kie troviĝas Takeda-filio de Oomoto (« Becuin »). Eĉ se estas nur frua mateno, jam multas homoj irantaj al la kastelo kaj eĉ nemalmultaj revenantaj de tie. Ili kun scivolemo rigardas nin : ŝajne, la solajn eksterlandanojn, kaj ni kun plezuro salutas ĉiujn preterpasantojn : « Ohajo gozaimasu ! »

Kiam ni atingas la kastelon, post duonhoro, ĝi estas kovrita per densa nebulo, kiu aldonas misteran guston al la antikvaj ŝtonoj kaj arboj, kies siluetojn oni vidas tra la blanka nuba kovrilo. Eĉ la homoj ĉirkaŭe aspektas iom fantomece ! Oni devas iri tre atente, ĉar la vojo estas glita (« zuru-zuru », kiel oni diras en la japana lingvo, plena je onomatopeoj) — hieraŭ pluvis, kaj oni devas esti ege atentema, aŭ oni povas fali en la abismon de pli ol tricent metroj. Oni ne povas ne admiri kelkajn elegantajn Japaninojn, kiuj tamen portas helajn ŝuojn sur altaj kalkanumoj kaj tamen iel

sukcesas ne malpurigi ilin en la malbela bruna koto, tra kiu oni devas iri por atingi la altan punkton de la kastelo. Mi ankaŭ konstatas, ke en Usono aŭ en Kanado oni neniel lasus al homoj iri al tiu loko sen instali iun barilon por malhelpi, ke iu persono falu (ĉu intence aŭ neintence).

En la supra parto de la kastelo homoj jam multas. Oni staras kaj kun espero rigardas jen al la ĉielo, jen al la poŝtelefono por vidi la veterprogonzon. Ankaŭ Koba-ĉan montras al ni sian poŝtelefonon : la tago devas esti suna, sed aspektas, ke la nebulo neniam foriros. La homoj aspektas iomete ĉagrenitaj : eble, la prognozo eraris... Kiam ni jam decidis foriri, la miraklo okazas. La nebulo super ni maldensiĝas kaj ni vidas la ĉielon malfermiĝi. La unua afero, kiu aperas antaŭ miaj okuloj, estas la monto, kiu staras kiel insulo ĉirkaŭata de nuboj. La Japanoj nomas ĝin « nuba maro » (« un-kai »), kaj ĝi vere aspektas tiel ! La suno rapide disigas la nubon ĉirkaŭ ni, kaj jen la objektoj prenas sian kutiman formon : eĉ



tiuj strangaj fantomecaj estaĵoj apud vi nun aspektas kiel ordinaraj homoj. Du infanoj, kiuj dormis sur kovrilo, vekigis kaj kun mirigitaj okuloj rigardas suben al la nuboj. La veterprognozo ne eraris ! Tamen, mi havas alian teorion : nia

bonkora ĉiĉerono, Koba-ĉan, estas ne vere homo, sed anĝelo (*tenŝi* japane), ĉar li portis nin al la ĉielo, do, li devas havi bonan rilaton kun Dio kaj ŝanĝi la veteron laŭplaĉe ☺ Koba-ĉan ridas pro tiu klarigo kaj amuziĝas de tiu nova kromnomo.

Takeda kaj la ruinoj de la antikva kastelo havas apartan signifon por Oomoto ; en la 1930-aj jaroj ĝi eĉ apartenis al

tiu religio : la fakto, kiun oni ne mencias en la oficiala broŝuro ricevita ĉe la enirejo, je la bedaŭro de niaj akompanantoj. Sur la tereno de la antikva kastelo Oomoto eĉ planis konstrui la trian spiritan centron, aldone al tiuj en Kameoka kaj Ajabe, reprezentantaj umeon (japanan prunon) kaj pinon — la arbojn kun aparta signifo por Oomoto, ĉar bambuo (« take ») estas la tria sankta arbo por oomotanoj. La konstruadon malhelpis la



persekuto de Oomoto fare de la japana registaro : la t.n. « Dua Oomoto-afero », kiu komenciĝis en 1935 kaj daŭris plurajn jarojn. Pro la kontraŭo al la tiama japana militarismo, Oomoto perdis multajn el siaj terenoj, inkluzive de tiu en Takeda, ĝiaj sanktejoj kaj konstruaĵoj estis detruitaj (kvankam « Becuin », kie ni tranoktis, bonŝance, ne estis tuŝita). En Becuin troviĝas tre kurioza malnova foto farita mallonge antaŭ la Dua Oomoto-afero : jen aro da personoj, kun la gvidantoj, staras apud la kastelo, pozante por la foto. Iomete flanke de la grupo troviĝas granda figuro — multe pli granda ol ordinara homo. Kompreneble, tiu estaĵo ne estis kun la fotita grupo. Oni diras al ni, ke kelkaj homoj pensas, ke tio estis Dio — aŭ eble la fantomo de la malnova kastelo, kiu fojfoje vizitas sian malnovan regnon.

La kastelo estis konstruita antaŭ preskaŭ 600 jaroj : en la jaro 1441. Ĝi kelkfoje ŝanĝis siajn posedantojn, kaj oni supozas, ke ĝi estis detruita ĉirkaŭ la fino de la 16a jarcento. Sed, ĉu la kastelo estis vere detruita aŭ eble la homoj mem

forprenis la suprajn ŝtonojn post la forlaso de la kastelo fare de ties lasta mastro, oni ne scias : supozeble, la lasta kastelestro faris ritan *seppuku*, kiam oni akuzis lin pri la bruligo de la kastel-urbo. La supra parto de la kastelo estas kovrita de ŝtonetoj. Niaj gvidantoj rimarkigas, ke multaj el ili ne vere estas ŝtonetoj, sed la restaĵoj de la antikvaj tegoloj, kiuj iam kovris la kastelon — malfacilas kredi, sed tiuj ŝtonetoj-tegoloj kuŝas ĉi tie jam kelkcent jarojn...

Vidinte ion tiel ĉiele belan, kiel la ĉiela kastelo de Takeda, la vortoj mankas por priskribi siajn spertojn (kaj releginte tiun tekston mi denove konstatas, kiom mallertan laboron mi faris provante tion fari). Pro tio revenante hejmen per aŭto ni silentas, ĉar la parolado kvazaŭ forprenus la magion de tiu mistera loko. La Takeda-kastelo, kovrita de lakta nebulo, kaj la monto, kiu solece aperas, kiel insulo en la nuba maro, estos por ĉiam gravuritaj en mian memoron !

La paco eblas !

Jenja Amis



Depuis dix ans, l'Institut israélo-palestinien pour la paix d'Oomoto organise un programme d'échange pour les adolescents qui ont perdu un ou plusieurs membres de leur famille comme victimes des guerres ou des actes terroristes. Les ados qui viennent d'Israël et de Palestine habitent avec des familles japonaises et apprennent non seulement bien des choses sur la culture exotique du Pays du soleil levant, mais trouvent aussi le courage de vivre en paix avec d'autres ados, tellement proches géographiquement et culturellement, mais tellement éloignés politiquement...

Elpensi solvon por diversaj problemoj de la homaro estas ege facile. Renovigebla energio ? Neniu problemo ! Instali la sunpanelojn en ĉies hejmo ! Malsato ? Facile ! Justa komerco kaj redistribuado de manĝaĵoj. Internacia komunikiĝo ? Nu, kompreneble : Esperanto ! Facilas, ĉu ne ? Kio vere malfacilas estas *realigi* tion je la tutmonda skalo — kaj antaŭ ĉio, konvinki aliajn personojn pensi kaj agi same, kiel vi.

Israel-palestina konflikto estas unu el tiaj problemoj, kiuj ofte malesperigas multajn, eĉ la plej brilajn pensantojn kaj politikistojn de nia

tempo. Kolero naskas koleron, morto semas morton, venĝo pliigas venĝon... La reciproka malamo kvazaŭ eniras la sangon ekde infanaĝo, kaj foje aspektas, ke ne estas fino al tiu ciklo. Ĝuste pro tio, ĉiam, kiam mi vidas eĉ plej malgrandan paŝon por haltigi tiun ĉi malbonan cirkolon, tio feliĉigas mian koron. Dum la 100-a Japana Esperanto-kongreso mi lernis pri eble eta sur la tutmonda skalo, sed tre grava kaj tre konkreta agado por repacigi israelanojn kaj palestinanojn. Kompreneble, tiu agado ne povas solvi la tutan komplikan kaj kompleksan situacion, sed eĉ se ĝi helpas solvi ĝin je la nivelo de kelkaj individuoj, ĝi tamen estas ege grava kaj necesa. Ja

milito komenciĝas ne sur la batalkampo, sed en la kapoj de homoj, kaj same tie, en la kapoj de homoj, devas komenciĝi paco. Ĉi-oktobre ni parolis kun la kunorganizantoj de la israel-palestina porpaca agado — esperantistoj kaj oomotanoj Hiromi Yano kaj Yasuo Tabuchi, kiuj plezure rakontis al ni pli pri tiu ĉi admirinda iniciato.

« Ni venis kiel unu grupo... kaj ni foriros kiel unu grupo »

Imagu la jenan scenon : grupo de gejunuloj forflugas el Japanio hejmen, kaj duono de la grupo estas haltigita por pli severa kontrolo ĉe pasportkontrolo. La aliaj grupanoj faris, kion amikoj kutime farus en tia situacio : ili trankvile atendis siajn kamaradojn, eĉ se tio signifus maltrafon de sia aviadilo. Tamen, tiu ĉi situacio estis iom neordinara : la duono de la grupo, kiu rapide pasis la kontrolon, estis la junula



delegacio el Israelo, kiu venis al Japanio por partopreni en la israel-palestina porpaca interŝanĝo. La alia duono de la grupo, kiel vi, certe, jam divenis, estis la palestinaj junuloj. La israelanoj povis jam esti sidantaj en aviadilo, sed ili preferis dum tri horoj atendi siajn palestinajn amikojn. « Ni venis ĉi tien kiel unu grupo, kaj tiel, kune, ni foriros », pensis la junuloj. Kaj tiel, kune, ili foriris de la Lando de Leviĝanta Suno... Ĉiu al sia hejmloko : iuj al Israelo, kaj aliaj al Palestino, tiom proksimaj geografie sed tamen tiom apartaj pro politiko...

Tiuj gejunuloj aspektis kiel ordinaraj adoleskantoj, portantaj ĝinzojn, t-ĉemizojn kaj aŭskultantaj muzikon. Tamen, ili ne estis ordinaraj junuloj : ĉiuj senescepte estis la plej delikataj personoj, kiuj perdis almenaŭ unu el siaj gepatroj, geonkloj, gefratoj aŭ gekuzoj pro militoj aŭ teroristaj

atakoj. Ili pasigis unu semajnon en Japanio kaj amikiĝis kadre de la interŝanĝa projekto, kiu celas

amikigi junulojn, kiuj tro june eksciis, kion signifas perdi siajn familianojn pro militoj... Tiu historio en la flughaveno okazis en la jaro 2003 — la jaro, kiam oni komencis tiun ĉi projekton. Jam okazis pluraj tiaj interŝanĝoj, la lasta el kiuj estis en aŭgusto 2013 en la urbo Kiotango.

« Ni ne havas konfidon. Tial paco neniam venas. »

Same kiel en la antaŭaj jaroj, ankaŭ en aŭgusto 2013 israelaj kaj palestinaj adoleskantoj pasigis unu semajnon en la domoj de ordinaraj Japanoj : en unu japana familio ĉiam loĝis po unu israela kaj po unu palestina junulo aŭ junulino. « Loĝi kune por palestinoj kaj israelanoj estas io, kion tiuj junuloj neniam antaŭe povis imagi », diris al ni Yasuo Tabuchi, pasia kaj aktive engaĝita en la projekto. Laŭ s-ro Tabuchi, multaj el tiuj junuloj estis kaptitaj en la malbona ciklo « venĝo-sufero-venĝo », kaj partopreno en tiu projekto por ili estis la maniero rompi ĝin. Ĝuste tio estas, fakte, la celo de tiu interŝanĝo : ĝi permesas eligi la infanojn de tiu ciklo kaj doni al ili la ŝancon por interamikigo kaj interkompreniĝo sur neŭtrala tereno kaj malproksime de sia hejmo. La malproksimeco de la kutimaj cirkonstancoj kaj de la rutino, aliaj vivmaniero, etiketo, kulturo, muziko

kaj kutimoj helpis al multaj el la partoprenantaj junuloj kompreni, ke ili havas pli da similaĵoj ol malsamecoj rilate la manĝaĵojn, muzikon aŭ eĉ lingvon, notis s-ro Tabuchi.

Diri, ke la junuloj tre ŝatis la restadon en japanaj familioj, estas diri nenion : ĉiuj, kiuj iam vizitis Japanion, tre bone scias, ke japana gastamo vere ne havas limojn. Kaj la japanaj gastigantaj familioj faris ĉion, por ke la infanoj ĝuu, sentu sin hejme kaj spertu la kulturon de la gastiga lando, per prezentaĵo de teceremonio, muziko kaj artaĵoj, surmetado de tradiciaj japanaj vestaĵoj kaj eĉ la vizito al la japana ĉefministro. La historion de tiuj junuloj ankaŭ sekvis japana televido, kaj plej



atente filmis ilian surprizan reagon al la unuafoja gustumado de la japana ceremonia teo (« maĉĉa ») kun iom amara gusto. « Gusto de verda teo estas tre forta kaj multaj gejunuloj ne povis perfekte eltrinki la teon, sed tamen ili

plezure manĝis la dolĉaĵojn », diras ridetante s-ro Tabuchi, aldonante, ke alkutimiĝo al manĝaĵoj estas ĉiam grava kultura barilo. La infanoj ankaŭ kune grimpis monton, kio evidentiĝis por la partoprenantoj kiel vera inico : kune ŝvitante kaj kuraĝigante unu la alian, israela knabo

Nur kaj palestina knabino Amal, en la kompanio de japanaj infanoj kaj plenkreskuloj, kune atingis la pinton. « Ĉiu agado, ankaŭ agado por paco, estas granda laboro, kaj nur kun ŝvito, kun strebo, kaj kune oni povas atingi ĝin », tiel s-ro Tabuchi resumis la esencon de tiu eduka ekzerco.

Certe, la amikiĝo inter la infanoj ne okazis je la



Kune ŝvitante kaj kuraĝigante unu la alian, israela knabo Nur kaj palestina knabino Amal kune atingis la pinton de monto.

unua momento : la infanoj prenis iom da tempo por alkutimiĝi, interkompreniĝi kaj amikiĝi unu al la alia. Unu partoprenanto diris, ke tiuj dek junuloj estas kuraĝaj, ĉar ordinaraj junaj homoj el Israelo kaj Palestino ne povas pasigi tempon agrable kune

en ĉi tiu maniero. Ankaŭ la gvidantoj de tiujara evento estis eksterordinaraj : se antaŭe dum la komuna fotado la du grupoj kutime sidis aparte, la lastjara grupo, kun la instigo de iliaj gvidantoj, ekde la komenco miksiĝis eĉ por la unua komuna fotado. Fine de la semajna restado, oni demandis al la infanoj pri iliaj impresoj pri Japanio kaj tiu ĉi interŝanĝo. La respondoj de la

partoprenantoj estis kortuŝaj : Amal, la palestina knabino, diris, ke ŝia sonĝo estas neniam da bataloj plu... Israela kondukanto de la grupo Yubal faris tre sagacan rimarkon kaj diris, ke Japanoj fidus unu la alian, kaj ĉe li « la baza problemo estas, ke ni ne havas konfidon. Tial paco neniam venas ! »

Dank' al agemo, Esperanto kaj feliĉa hazardo

S-ro Hiromi Yano estas la ĉefa motoro de tiu ĉi interŝanĝa projekto, kun kiu aktive kunlaboras la Israel-Palestina Porpaca Instituto de Oomoto, kiun li prezidas. Hiromi Yano estas ridema, amikema kaj agema, kaj li kunlaboras kun diversaj aliaj organizaĵoj, kiel *Peres Center for Peace* [Porpaca Centro de Peres] kaj organizaĵo, kiu helpas al la viktimoj de militoj kaj teroristaj atakoj. Fakte, li mem vojaĝas por elekti la partoprenantojn, trejni la gastigantajn familiojn, renkontiĝi kun partneroj kaj politikistoj, ktp. La Japanoj ne kutimas akcepti eksterlandajn gastojn (esperantistoj, certe, estas escepto), kaj ofte ili scias tre malmulte pri Israelo kaj Palestino, do, unu el la



Kun la ĉefministro, s-ro Abe

gravaj taskoj por s-ro Yano fariĝas preparado de la gastigantaj familioj. « Ofte oni demandas, kion mi faru, se la infanoj komencas batali », li diras. Nu, bataladoj neniam ĝis nun okazis, sed estas diversaj aliaj zorgoj : ekzemple, manĝaĵoj (oni instrukcias la gastigantajn familiojn ne kuiriri porkaĵon). Hiromi Yano intence elektas ne tro

religiemajn adoleskantojn (simple ĉar estas malfacile alĝustiĝi al severaj normoj de manĝaĵo kaj adapti la horarojn por la preĝado). La solaj aliaj kriterioj por elekti partoprenantojn estas interesiĝo pri Japanio kaj almenaŭ baza kono de la angla (ĉar tio estas la ĉefa lingvo de la interŝanĝo) : pli facila kriterio ĉe israelanoj, kaj iom malpli facila ĉe palestinanoj.

S-ro Yano havas sennombrajn anekdotojn ligitajn al tiu ĉi interŝanĝa programo. Ekzemple, pri tio,

kiel tiu programo komenciĝis — dank' al Esperanto, Oomoto kaj... feliĉa hazardo ! En 1999 Yano iris al Israelo por prepariĝi al la UK-2000 en Tel-Avivo, kaj antaŭ la vojaĝo li renkontis la urbestron de Ajabe (tiu urbo, cetere, estas la unua japana mondfederisma urbo kaj loko, kiun Oomoto konsideras la Jerusalemon de Oriento). La urbestro de Ajabe — s-ro Shikata — duonŝerce, petis transdoni amikan mesaĝon de la urbo Ajabe al la urbo Jerusalemo kaj la proponon (kial ne?!) fariĝi ĝemelurboj. S-ro Yano bone plenumis tiun peton, renkontiĝis kun la urbestro de Jerusalemo kaj proponis la ĝemeliĝon. « Bona ideo », diris la tiama urbestro de Jerusalemo, kvankam neniu en Ajabe vere povis kredi, ke tio vere okazos... ĝis kiam oni ricevis fakson de Jerusalemo kun la oficiala propono de ĝemeliĝo. La ĝemeliĝo oficiale okazis en 2000, kaj kelkajn jarojn poste la urbestro de Ajabe proponis fari kune iun projekton, kiu antaŭenigus pacon inter Israelo kaj Palestino. Tiel estiĝis neprofitcela organizo, kaj tiel s-ro Yano, kunlabore kun multaj aliaj organizoj kaj la gastigantaj urboj komencis tiun ĉi laboron. Al mia demando, kiel li sukcesis organizi la viziton al la



ĉefministro de Japanio, li ridante diras : « Mi hazarde havis telefonnumeron de la sekretario ». Do, la magia recepto estis « telefoni, klarigi kaj konvinki » !

S-ro Yano bone komprenas, ke tiu ĉi projekto, certe, ne solvos la tutan situacion. Sed tamen ĝi faras sian parton, starigas modelon por aliaj kaj sekvas la ideon de Onisaburo Deguĉi, la kunfondinto de Oomoto, kiu antaŭ naŭdeko da jaroj diris, ke la israel-palestina paco estas ekstreme grava por paco en la mondo. De tempo al tempo, s-ro Yano ankaŭ renkontiĝas kun la antaŭaj partoprenantoj. Same en 2013 li revidis kelkajn partoprenantojn de la interŝanĝo, kiu okazis en 2003. Li bone rememoris la vortojn de unu palestina junulino, kies revo estis eniri la politikon en la nova lando, Palestino. Ŝi diris, ke la restado en Japanio donis al ŝi esperon, kaj eĉ se poste ŝi malesperiĝis, se ŝia revo pri politiko efektiviĝos kaj se iun tagon ŝi devos fari gravan decidon rilatan al Israelo, antaŭ ol fari la finan decidon, ŝi rememoros tiun senzorgan semajnon en Japanio, kiun ŝi pasigis kun israelano kaj kiu, eĉ se por mallonga tempo, fariĝis ŝia amiko...

Eventoj en Ukrainio : vidpunkto de krimeano

Dum la lastaj monatoj la tuta mondo spektis kun maltrankvilo la eventojn en Ukrainio. Kiel, eble, la legantoj de *La Riverego* jam scias, ĝia redaktoro naskiĝis en Ukrainio (tiam parto de Sovetunio), en la urbo Kievo, kiu fariĝis la epicentro de la protestaj movadoj. Same mi, maltrankvile, sekvis la novaĵojn — ĉagrenite ne nur pro la eventoj mem, sed ankaŭ pro tio, ke la raportoj plej ofte montris nur unu flankon de la « vero ». La artikolo, kiun ni prezentas, estas nia strebo doni la voĉon ankaŭ al la alia flanko. Ĝi estas verkita de Jefim Zajdman, denaska loĝanto de Krimeo, kaj ĝi bone reprezentas la sentojn de multaj krimeanoj, kiuj lastatempe decidis secesii de Ukrainio kaj aliĝi al Rusio : lingva demando, cetere, ankaŭ ludis sian rolon en tiu decido. Ĉu la artikolo de Jefim estas senpartia ? Ne, kaj ĝi ne pretendas esti... ĝi estas simpla opinio de unu persono, kiu travivis la eventojn. Kaj, eble, ankaŭ ĉar verki senpartian



artikolon pri tiu tikla temo simple ne eblas. Tamen, ni pensas, ke ankaŭ la « hereza » opinio de krimeaj ruslingvanoj meritas esti aŭdita.

Jefim estas bone konata en Ukrainio kaj ekster Ukrainio : gvidanto de E-klubo « Tero » en fama ripozurbo Jalto, en Krimeo, longdaŭra vicprezidanto de Ukraina Esperanto-Asocio (nomumita de la asocio kiel Esperantisto de la jaro en 2011 kaj 2012) kaj pasia esploranto pri la historio de la frua Esperanto-movado. Lia klubo, sentroige, estas la plej aktiva en la lando : ĉe ĝi funkcias E-teatro, kiu dum la lastaj kvin jaroj prezentis spektaklojn en multaj E-renkontiĝoj kaj festivaloj. La klubo organizis tri urbajn Lingvajn Festivalojn, kie okazis tradukkonkursoj, en kiuj ĉiufoje gajnis tradukoj pere de Esperanto. Lia devizo estas : « Unue mi estas homo, poste judo (ruslingva), esperantisto (ekde 1957 jaro), matematikisto k.a. ».

Noto: La redakcio kaj la Esperanto-Societo Kebekia ne respondecas pri opinioj de unuopaj aŭtoroj

Jefim Zajdman

Antaŭ la eventoj en Krimeo

Unue mi volas diri, ke rusoj, ukrainoj kaj belorusoj estas frataj popoloj. Due, ke rusa lingvo devus havi rajton esti dua oficiala lingvo en Ukrainio, ĉar preskaŭ ĉiuj en Ukrainio kapablas paroli (aŭ almenaŭ kompreni) ĝin, kaj en multaj partoj de Ukrainio la rusa lingvo estas la lingvo de la plejmulto.

Mia rilato al Janukoviĉ, la eksigita prezidento, kaj lia partio komence estis pozitiva, ĉar li promesis fari la rusan lingvon la dua oficiala lingvo. Tial mi, kiel multaj aliaj krimeanoj, voĉdonis por li kiel prezidento de la lando. Sed post kiam oni enprizonigis la estrojn de la antaŭa registaro, nome Timoŝenko kaj Lucenko, kaj kiam la partianoj de Janukoviĉ komencis uzurpi fremdajn posedaĵojn, ili montris sin banditoj, kaj pro tio mi voĉdonis por la partio de Timoŝenko en la parlamentaj elektoj. Fakte, lin kaj liajn partianojn


interesis nur mono, pri la popolo Janukoviĉ ne interesiĝis. Politike li, kiel la antaŭaj prezidantoj, ĉiam manovris inter Ukrainio kaj Rusio, kaj montris intereson al la Eŭropa Unio.

Dum lastaj 23 jaroj Ukrainio estis demokratia lando. Laŭ mi, eĉ tro demokratia, kio permesis al

Usono plenigi ĝin per agentaro, helpi al la naciistoj de okcidentaj regionoj prepari armitajn banditojn por Majdan — kaj, fakte, eĉ gvidis ilin tien¹.

Novembre 2013 en intertraktoj de Janukoviĉ kun Eŭropa Unio oni proponis al Ukrainio mizeran monhelpon por preventi la krizon okaze de la asociiĝo², kiun Janukoviĉ facilanime rifuzis, des pli, ke li sciis, ke li povas ricevi de Rusio multe pli grandan monhelpon de

15 miliardoj da dolaroj. Tiam komenciĝis pacaj manifestacioj en Majdan (la centra placo en Kievo, kiu fariĝis la epicentro de la eventoj), kiujn amase partoprenis kieva junularo. Janukoviĉ promesis, ke li daŭrigos intertraktojn kun EU por interkonsenti pri pli da kontraŭkriza monsumo, sed al la kieva junularo aliĝis radikalaj elementoj



Ruslingvanoj en Ukrainio, laŭ la Kieva Internacia Instituto pri Sociologio (blue : rusa, flave : ukraina)

el la okcidentaj regionoj de Ukrainio, kiuj celis pliakrigi la situacion : ili provokis la policon kaj, sekve, estis dispelitaj kaj batitaj. Ĝuste tion planis la radikaluloj, kaj ili komencis konstrui multajn barikadojn, perforte okupi gravajn urbajn administraciajn konstruaĵojn kaj ataki nearmitajn policanojn de la speciala taĉmento « Berkut » per bastonoj, ŝtonoj kaj molotov-kokteloj (brulboteloj).

Samtempe estis seninterrompa agitado sur la scenejo en Majdan, kiun partoprenis ankaŭ reprezentantoj kaj gvidantoj de Pollando, Litovio, Usono, Eŭropa Unio. Paroli sur la scenejo eblis nur « por »... Neniu reprezentanto de Rusio aperis



tie, sed tutegale ukrainaj amaskomunikiloj kriis pri rusia enmiksiĝo. Komenciĝis informa milito, kaj flanke de Usono eĉ vera « fera kurteno ».

Tamen finfine Janukoviĉ kaj reprezentantoj de EU interkonsentis pri la armistiko, kiu komencis efektiviĝi : oni liberigis parton de la arestitaj batalantoj, kaj la polico komencis forigi parton de la barikadoj. Sed tio ne taŭgis por la radikaluloj kaj iliaj mastroj el eksterlando, kaj rezulte ili okazigis provokon. Aperis iuj kaŝpafistoj, kiuj pafis ambaŭflanken : jen al la manifestaciantoj, jen al la polica taĉmento « Berkut »³. Tio frenezigis la manifestaciantojn kaj ili komencis ataki la policistojn. Ĉi-foje la radikaluloj jam estis bone



Kun la tempo, pacaj manifestacioj por Eŭropa Unio degeneris en anarkion

armitaj, ĉar en la okcidentaj regionoj ili prirabis armildeponejojn⁴. La polico, aliflanke, havis pafilojn nur kun gumaj kugloj kaj tial ĝi rapide retiriĝis. Oni tuj deklaris, ke la kaŝpafistojn dungis Janukoviĉ.

Tiamaniere la armistico estis rompita kaj formiĝis nova registaro, eĉ se poste aperis pruvoj, ke la kaŝpafistojn uzis provoke la radikaluloj aŭ la nova registaro — tion konfirmis interparolo de la estona ministro de internaj aferoj kun la ĉefa reprezentanto de EU Catherine Ashton, kiun oni kaŝe registris kaj montris en Youtube⁵. Rezulte, Rusio deklaris, ke okazis puĉo, ke la nova registaro estas nelegitima, kaj ke Janukoviĉ restas laŭleĝa prezidento de Ukrainio.

La 23-an de februaro la nova registaro abolis la leĝon pri lingvoj por naciaj malplimultoj, laŭ kiu en sud-orientaj regionoj kaj Krimeo, kie la plejmulto de loĝantoj estas rusparolantoj, la rusa lingvo havis la statuson de la regiona lingvo, samrange kiel la ukraina. La loĝantaro tie estis



Dum la manifestacioj aperis novnaziismaj simboloj

timigita de eblaj invadoj de armitaj banditoj al iliaj urboj, ĉar dank' al la ukrainaj televidprogramoj pri la eventoj en Majdan ili vidis tiujn ekstremulojn.

Krome, la nova registaro anstataŭigis regionestrojn en tri orientaj regionoj per oligarĥoj por kontraŭstari tie popolajn protestojn⁶.

Du el la plej ekstremdekstraj organizoj en Ukrainio, kiuj arde aktivis ĉe Majdan, estas la partio « *Svoboda* » (« Libereco ») sub la gvido de Tjahnibok kaj la taĉmentoj « *Pravij*

Sektor » (« Dekstra sektoro », kiu fariĝis partio ĉi-marte), sub la gvido de Dmitro Jaroŝ. Ilin kaj aliajn ekstremulojn unuigas malamego al rusoj kaj judoj⁷; plejparte ĉiuj ili estas el la regiono Galicio de okcidenta Ukrainio. Oni ŝercas, ke ili eĉ pretus fariĝi islamistoj, se tio helpus tute liberiĝi de Rusio. Iliaj herooj estas Bandera kaj Ŝuĥeviĉ — gvidantoj de la Ukraina Ribela Armeo, kiu dum la dua mondmilito batalis kontraŭ Sovetunio kune kun la nazioj⁸. Tjahnibok estas arda ksenofobo ;

Jaroŝ nomas sin revoluciulo⁹. Li jam deklaris, ke li pretas batali por la prezidenta posteno la 25-an de majo, kaj ke liaj homoj ne forlasos Majdan-on kaj ne fordonos siajn armilojn, por postuli de la registaro pluajn ŝanĝojn. Do, la situacio en Kievo estas tute neantaŭvidebla, kaj la unuan puĉon povos sekvi la dua.

Eventoj en Krimeo

Ankaŭ mi kun la edzino vivis en Jalto en konstanta streĉo. 26-an de februaro la kieva registaro decidis eksigi la parlamenton de la Krimea Aŭtonoma Respubliko. Ĉe la parlamento tuj komenciĝis du manifestacioj : kontraŭstaris krimeaj tataroj kaj la rusa komunumo. Estis interbataloj, aperis viktimoj. Gvidanto de la rusa komunumo Aksjonov intervenis inter la batalantoj kaj sukcesis apartigi ilin.

Nokte reprezentantoj de la rusa komunumo penetris en la parlamenton, kaj baldaŭ la



Propagandilo de la antaŭa junulara sekcio de la partio « Svoboda », « Patriotoj de Ukrainio », kiu poste aliĝis al la partio « Pravij Sektor ». Ilia simbolo, Wolfsangel, estis uzata de SS kaj aliaj naziaj organizoj

parlamento deklaris la decidon organizi referendumon pri la stato de la aŭtonoma respubliko : ĉu ĝi aliĝu al Rusio aŭ restu en Ukrainio, sed kun la konstitucio de la jaro 1992, laŭ kiu Krimeo havis pli da rajtoj.

Tiam mi kun la edzino promenis en la urbo kaj ekvidis en la centra placo amason da homoj.

Evidentiĝis, ke okazas registriĝo al la taĉmentoj de sindefendo. Ekde tiam la homoj en Krimeo ekspiris libere, kaj ili ne plu timis la alvenon de la armitaj banditoj, ĉar la sindefendaj taĉmentoj formiĝis en ĉiuj urboj, kaj en Sebastopolo situas rusia floto, kiu, se necese, defendos ilin. La rusa floto oficiale rajtas situi tie ĝis 2017 kaj havi plurajn bazojn en la duoninsulo, kiuj provizas la floton. Entute en la floto estis ĉ. 15 mil maristoj kaj soldatoj, kaj

Rusio havis la rajton pligrandigi la kvanton ĝis 25 mil.

La taĉmentoj tuj baris la mallarĝan terkolon, kiu

ligas Krimeon kun kontinenta Ukrainio, por preventi enpenetron de la radikaluloj. Ili ankaŭ ekgardis kelkajn strategiajn objektojn (du flughavenojn kaj televidan stacion). Al la taĉmentoj aliĝis krimeaj anoj de « Berkut » — tio estis rezulto de alia eraro de la kieva registaro : malfondo de « Berkut », post kio radikaluloj persekutis la berkutanojn.

Ĉar en la duoninsulo troviĝis ankaŭ multaj ukrainaj militaj bazoj kun kirasaj transportiloj kaj ĉ. 20 mil soldatoj, Kievo povis ordoni al la militistoj subpremi la novan krimean registaron. Tial ĉiujn bazojn ĉirkaŭis taĉmentoj de sindefendo kun soldatoj el la bazoj de la rusa floto (la loka loĝantaro ame nomis tiujn soldatojn « ĝentilaj verdaj hometoj »). Ĉio ĉi helpis rapide prepariĝi al



**Afiŝo por krimea referendumo (Sebastopolo) :
« 16-an de marto ni elektas inter »**



Postreferenduma festado en la krimea ĉefurbo

la referendumo, kiu okazis la 16-an de marto. Estis klare, ke la plejmulto de la loĝantoj voĉdonos por aliĝo al Rusio, sed ni timis provokojn : ja 12% de krimeaj tataroj apartenas al aparta organizaĵo *Medĵlis*, en kies vicoj troviĝas radikalaj islamistoj¹⁰.

Ni ne dubis, ke multaj homoj partoprenos en la voĉdonado, kaj plejmulto voĉdonos por Rusio, des pli en Sebastopolo, kie preskaŭ ĉiuj loĝantoj estas rusoj kaj sentas sin patriotoj de la urbo-heroo¹¹. Ili elektis « popolan urbestron » kaj kolektis monon por la

salajroj de eks-berkutanoj. Sed ni ne antaŭvidis tiom amasan partoprenon (ĉ. 80%) kaj voĉdonon por Rusio (96%). Homoj enviciĝis por voĉdoni antaŭ la malfermo de voĉdonejoj : tiu tago kaj la sekva fariĝis festo. La balotadon ĉeestis multaj

ĵurnalistoj kaj ekspertoj, kaj ĉiuj ili konvinkiĝis, ke la balotado estis organizita bone kaj senripoĉe.

Oni timigis nin, ke somere fiaskos la ripoza sezono en Krimeo, kaj ke Ukrainio malŝaltos elektron al Krimeo, sed ni jam scias, ke ĉi-somere el Rusio al Krimeo venos pli da ripozantoj ol iam antaŭe. La elektron Ukrainio vere duonigis, sed ni ne sentas tion, ĉar Rusio helpis bone prepariĝi al tio.

Restas aldoni, ke la legantoj eble ne tre fidis tion, kion mi skribis, ĉar la okcidenta gazetaro kaj televido kaŝis la veron, precipe en Usono, kie fakte estis kaj restas « fera kurteno ». Des pli ke mi ne povis detale priskribi la situacion. Tial, se aperos demandoj, mi pretas respondi al ili en la sekvaj numeroj de la revuo.

Notoj

¹ Kvankam usonaj registaraj organizoj neniam agnoskis sian enmiksiĝon en la eventoj en Ukrainio, estas indikoj, ke ili ja ludis gravan rolon ; ankaŭ privataj organizoj, kiel tiu de George Soros, estis aktive engaĝitaj en la eventoj en Ukrainio. Pli da informoj, ekzemple, en [The Guardian](#) kaj [BBC](#) (angle).

² Legu pli en [Vikipedio](#) (angle).

³ Legu pli en [Christian Science Monitor](#) (angle).

⁴ Legu pli en [Kyiv Post](#) (angle).

⁵ Legu pli en [Independent](#) (angle).

⁶ Unu el tiuj novaj guberniestroj estas la dua plej riĉa persono

en Ukrainio, Ihor Kolomoyskyi (legu pli en [Vikipedio](#), angle).

⁷ Antaŭe nomata la Social-naciista Partio de Ukrainio, « *Svoboda* » estas, interalie, samideano de la Nacia Fronto (« *Front national* ») de Francio kaj la Brita Nacia Partio (« *British National Party* »), kun kiuj ĝi iam membris en la ekstremdekstra organizo la Eŭropa Alianco de Naciaj Movadoj. Oficiale, « *Dekstra Sektoro* » difinas sin kiel nek ksenofoba nek antisemita, sed naciista, defendanta la tradiciajn valorojn de blanka, kristana Eŭropo. Aliflanke, la regiona kunoriganto de la organizo Oleksandr Muziĉko, mortigita de la nova ukraina registaro ĉi-marte, deklaris ke « li batalos kontraŭ komunistoj, judaĉoj kaj rusoj tiomlonge, kiom la sango fluas tra liaj vejnoj ». Multaj komentariistoj ne hezitas apliki la etiketon « nazia » aŭ « novnazia » al tiuj du partioj. Tiel komentis ilian orientiĝon Vesna Popovski, esploristo de la Eŭropa Instituto de la Londona Ekonomika Lernejo : « De unu flanko, ilia agendo estas eŭropa — ili tre ŝatus aliĝi al la Eŭropa Unio. De alia flanko, ili estas kontraŭjudaj, kontraŭgejaj kaj kontraŭrusaj » (legu pli en [USA Today](#), angle).

⁸ La sekvantoj de [Bandera](#) kaj [Ŝuheviĉ](#) estis, interalie, respondecaj pri mortigo de 70-100 mil poloj en 1944.

⁹ Pro siaj antisemitaj paroloj Tjahnibok eĉ estis elpelita el la parlamento (legu pli en [Jamestown.org](#) [angle]. Jaroŝ estas serĉata de la rusa polico pro kunlaboro kun ĉeĉenaj teroristoj kaj flamigaj paroloj (ekzemple, alvokoj eksplodigi rusajn gas-kondukilojn en Ukrainio — legu pli en [Vikipedio](#)).

¹⁰ En Krimeo nun loĝas ĉ. 300 mil krimeaj tataroj (la tuta loĝantaro de Krimeo estas ĉ. 2,3 milionoj).

¹¹ Sebastopolo estis grava areno de batalo dum la Krimea Milito, kun la fama 349-taga sieĝo de la urbo, kaj dum la Dua Mondmilito, kun 250-taga sieĝo, post kio ĝi ricevis la nomon « urbo-heroo » — legu pli en [Vikipedio](#).



Literature
La Idoj de la Suno

Dennis Drown

Ĉapitro 2

*Matene
Kiam la Taga di'
Kolordancas kun la diin'*

*Rigardu respekte
Malfermu memore
Trovu en vi*

*Matene
En vi trovu lin
Kolordancu kun la diin'*

- prapatroj de la Taŭakla

La matena ĉielo pleniĝis je ruĝaj kaj oraj radioj de brila suno. Etaj nuboj, streĉiĝante tra la ĉielo, fiere reflektis la kuraĝajn kaj fajrecajn kolorojn. Ili ardis kiel rozpetaloj brulantaj super la montaro. La ruĝaj

dezertaj sabloj briletis per la glora matena suno, dum ĝi vekigis de sia profunda dormo kaj ĉasis la lunon for de la ĉielo. Paradizo estis tie ĉi por tiu, kiu sciis vidi, tiu, kiu sciis malfermi siajn okulojn al la mirindaĵoj de la Tero.

Barbara ne povis vidi ĝin. Ŝi ne rimarkis la belecon de la dezerta sunleviĝo. Ŝi ankoraŭ frustrigis pro tio, ke ŝi devis dividi tendon kun sia frateto. Pasintnokte li dufoje vekis ŝin, ĉar li pensis, ke li aŭdis ian sonon de ekster la tendo. Ĉu la bubo timas ĉion? pensis Barbara. Sufiĉe malbona estas mia sorto, ke mi devas iri kun Paĉjo ĉi tien, meze de nenie, por vivi kun liaj sovaĝuloj, sed nun mi havas lin kun mi preskaŭ tuttempe. Hejme almenaŭ ni ambaŭ havis niajn proprajn ĉambrojn, kaj eblis lin eskapi.

Tamen eĉ tie la vivo ne estis tiom bona. Mi ne povas kompreni, kial li ĉiam devas esti kun mi,

aparte kiam miaj amikinoj venas viziti min. Sed nun mi ne plus havas amikinojn. Nun mi kaj mia stulta frato devas esti ĉiam kunaj en tiu ĉi damna tendo, ĉiam kunaj en tiu ĉi damna loko.

Tiam la bubo ekvekiĝis. « Bonan matenon », li diris dormeme. Barbara eliris el la tendo sen doni al li ajnan respondon. Ŝia patrino estis tie, apud la fajro, kuiranta ion por la matenmanĝo.

« Bonan matenon ! Kiom da ovoĵ vi volas ? »

Barbara rigardis sian patrinon dum momento. Ĉu vere ŝi povas esti tiel gaja, aŭ ĉu ankaŭ ŝi abomenas tiun ĉi dezerton ?

« Du. Dankon », Barbara respondis finfine kaj sidiĝis apud la fajro por forigi la matenan malvarmon. La aero tre freŝis kaj iom malvarmis en la dezerta mateno, kaj tia ĝi restos dum paro da horoj, antaŭ ol la suno iros sufiĉe alten por vere ekbaki ĉion. La varmo de la fajro trankviligis Barbaran iomete, kaj ŝi ekpensis pri sia antaŭa vivo, la vivo, kiun ŝi forlasis antaŭ nur kvin tagoj.

Ŝia menso vagis, ĝis ŝi ekpensis pri sia adiaŭa festo. Venis ĉiuj ŝiaj amikinoj. Ŝi pensis pri sia amikinaro. Mi devintus pasigi la someron kun ili, ŝi pensis. Estis la somerferio antaŭ ŝia antaŭlasta jaro en liceo. Sed nun ŝi ne finus la liceon kun siaj

geamikoj. Anstataŭe ŝi pasigos du jarojn en tiu ĉi dezerto kun la propra patro kiel hejminstrua instruisto. Barbara pensis pri la koncepto. Hejminstruo. Ĉu ĝi povus esti vera instruo ? Certe ĝi neniel estus kiel hejmo. Ĝi estus nur malproksima, tiom for de ĉio, kion ŝi konas.

Tiam ŝi pensis pri Danielo. Ankaŭ li ĉeestis la feston, kvankam li heziteme diris al ŝi, ke li ne volas veni, ĉar li ne volas diri « ĝis ». Kia dolĉulo ! Kia belulo, kun siaj helbrunaj haroj jam denove iomete tro longaj, sufiĉe longaj por zorgigi Panjon. Ĉu Panjo sciis, ke li kisis min tiun tagon ? Ne. Kompreneble, ne. Kiel ŝi sciis ? Barbara rememoris lian vizaĝon, liajn verdajn okulojn, kiuj fikse rigardis la ŝiajn. Profundan malĝojon ŝi vidis en tiuj okuloj, dum ili parolis pri la venonta misio.

Iel ili trovis sin solaj en la gastoĉambro, sidantaj sur la lito. La kurtenoj estis fermitaj, kaj Barbara rimarkis, kiel la ombroj falis sur la vizaĝon de Danielo. Tiel li aspektis mistera kaj multe pli aĝa ol siaj deksep jaroj.

« Tiom terure vi mankos al mi », Danielo diris al ŝi. « Mi petos al miaj gepatroj, ĉu mi povos iri viziti vin, eble pli malfrue en la somero. Verŝajne la eklezio permesus... » Lia voĉo haltis. Ili ambaŭ sciis, ke nek liaj gepatroj nek la eklezio taksus tion

bona ideo. Ili ne volis paroli pri tio.

Dum momento ili restis tie silente, ambaŭ ne sciante ekzakte kion diri. Tiam li tuŝis ŝian mentonon kaj milde karesis ŝian vangon. Liaj fingroj estis varmaj kaj Barbara sentis sin ekstremiti. Ŝi volis diri ion. Ŝi rigardis supren al lia vizaĝo kaj pensis, ke ŝi vidas larmon en lia okulo ? Belega knabo. Jen li kisis ŝin.

Neniam antaŭe knabo kisis ŝin. Ŝajnis, ke ŝiaj amikinoj ĉiam estis kisantaj iun knabon aŭ alian, sed ŝia strikta Kristana eduko emis nei al ŝi tian konduton. « Ho, Dio mia ! », ŝi pensis, kaj tiam, nu, tio ĉi tute ne malbonas. Ŝi apenaŭ povis kredi tion, kio estas okazanta. Ŝi devus diri al li ne. Ŝi devus atendi.

Ŝi ne volis atendi.

Barbara sentis la varmecon de Danielo. Ĝi estis bona. Sen konstati, kion ŝi faras, ŝi ekis interplekti siajn fingrojn en lian hararon kaj karesi lian kolon. Ŝi povis senti sian korpon respondi al lia varmo. Barbara ŝatis la kison. Ŝi ŝategis ĝin. Ekkompreno pri tio surprizis ŝin kaj ektimigis ŝin. Unue ŝi provis regi sian timon, rezistante al la varmo, kiun ŝi sentis, rezistante la sentojn de deziro, kiuj subite estis venantaj ŝajne el nenie. Ŝia korpo tamen volis

pli, kaj ŝi premis lian brakon, tirante lin pli proksimen al si. Ŝi redonis al li la kison.

« Barbara ? » Subite la fajro malaperis sub ondego de nova timo. Tiu ĉi estis timo de alia speco, timo, kiun ŝi tre bone konis. Barbara rigidiĝis. Ŝi tuj forpuŝis la manojn de Danielo kaj saltetis de sur la lito. Ŝi turnis sin al la pordo kaj vidis sian patrinon eniri.

« Ah, jen vi ! Kial tiom mallumas ĉi tie ? Barbara, oni... » Maria haltis, vidinte la knabon tie.

Barbara povis senti sian koron bategi, sonadi en ŝiaj oreloj. Laŭte ! Tiom laŭta ĝi estis, ke ŝi ektimis, ke ŝia patrino iel aŭdus ĝin.

« Nu, vi malaperis. Ne forgesu, ke vi havas aliajn gastojn ĉi tie. » Maria turniĝis kaj eliris el la ĉambro. « Vi scias, ke ne plaĉus al via patro, se vi malaperus tiel dum via propra festo », ŝia voĉo daŭrigis, dum ŝi malaperis al la koridoro.

« Jes, Panjo. Mi venas tuj », vokis Barbara. Rapide ŝi kisis la vangon de Danielo kaj elkuris el la ĉambro.

« Ankoraŭ dormanta ? » Barbara eliris subite el sia revado. Jen Panjo donanta al ŝi teleron kun ŝia ovaĵo, fingro-indikanta al ŝi paton kun frititaj

terpomoj. Ŝi ruĝiĝis iomete. Ŝi sentis sin, kvazaŭ ŝia patrino povus legi ŝiajn pensojn.

« Mi pensas, ke mi uzis tro da salo en la terpomoj, sed ĉiukaze ili bongustas. Kaj ne forgesu preĝi, antaŭ ol vi manĝos, Barbara. Tiuj ĉi malformalaj manĝoj, kiujn ni havas survoje, ne signifas, ke ni forgesu tiun, kiu provizis nin per tiuj ĉi bonaj nutraĵoj. Estu dankema. »

« Jes, Panjo. Kompreneble. »

Post la matenmanĝo ili malstarigis la tendojn kaj reŝarĝis la ĵipon. Tiu ĵipo, kiu antaŭ monato estis tute nova kaj briletis blue en la lumo, nun estis tute kovrita per polvo, kaj Barbara pensis, ke ĝi certe baldaŭ paneos. La dezerto prenas ĝin, ŝi pensis al si mem ; samkiel ĝi nun ekprenas niajn vivojn. Ho, damne !

Ŝi paŭtis de la malantaŭa seĝo. Estis la lasta tago de la vojaĝo al la vilaĝo de la Taŭakla, kaj ŝi intencis resti laŭeble en sia propra mondo. Ŝi diris nenion. Ŝia patro, aliflanke, fervore provis last-momente instrui al sia edzino iom de la Taŭakla lingvo. « Kia idioto ! », pensis Barbara. Li scias preskaŭ nenion. Eĉ mi povas aŭdi tion. Li pasigis tri monatojn en tiu vilaĝo antaŭ jaro. Ĉio alia, kion li scias pri ilia lingvo, venis de notoj, kiujn donis al li

la eklezio. Barbara provis laŭeble ne aŭskulti, dum li ludis kiel instruisto.

« Mi ankoraŭ ne komprenas la vortojn *gao* kaj *migau*. Vi diris, ke ili ambaŭ signifas *ni*. »

Stefano ridetis. « *Gao* estas *ni*, se oni enkalkulas la personon, al kiu oni parolas. Do, se mi uzas la vorton *gao*, mi parolas pri mi mem, pri vi, kaj ankaŭ eble (aŭ eble ne) pri aliaj personoj. Tamen, se mi uzas *migau*, mi ne enkalkulas vin. Mi parolas nur pri mi kaj alia persono aŭ aliaj personoj. »

« Ŝajnas al mi iom komplike. Ĉu vi pensas, ke eble ili volos lerni nian lingvon ? »

« Paĉjo », intermetis Roĉjo de malantaŭe, « hieraŭ la vojo finiĝis. Kiel ni scias, kiel iri al la vilaĝo ? » Ĉio ĉi estis por li tute nova sperto. Jen li pasigis horojn nur rigardante tra la fenestro sen elbuŝigi eĉ vorton. Jen li havis amason da demandoj, kiujn li starigis unu post la alia al siaj gepatroj. Hieraŭ li volis scii, kial, se tio ĉi estas dezerto, estas ne nur kaktoj, sed ankaŭ foje arboj. Stefano klarigis, ke ĉi tie ne pluvas dum preskaŭ la tuta jaro. Tiam, dum pli-malpli tri monatoj, oni havas sezonon de pluvo kaj multege pluvas dum tiu tempo. Plantoj aperas el nenie kaj kreskas freneze. Ili havos iom da verdaĵo. Post tiu sezono, preskaŭ ĉio mortos

denove krom la kaktoj kaj tiuj arboj. La Taŭakla nomas ilin *obaek*, kaj ili vidos plurajn tie, kie estos la nova hejmo.

Nun la demando temis pri la manko de bona vojo. « Nu », respondis Stefano al sia filo, « plejparte mi uzas la kompason por orientigi nin kaj mi diligente kalkulas la distancon, kiun ni veturas. Cetere memoru, ke mi jam estis ĉi tie antaŭ jaro. Mi memoras iom pri la loko. »

Tiel pasis la vojaĝo ĝis Maria ekvidis etan linion de fumo malantaŭ montetaro en la distanco. « Stefano, ĉu tio estas la vilaĝo ? » Ŝi fingromontris al la fumo.

« Ja estas ĝi ! », li diris. Ekscito montriĝis en lia voĉo. « Barbara, Roĉjo, ĉu vi vidas ? »

Ankaŭ Roĉjo ekscitiĝis. Li enspiris subite. « Kiom da tempo, antaŭ ol ni alvenos ? »

Barbara diris nenion. Ŝia koro komencis bati fortege, sed ŝi ŝajnis sin laŭeble neinteresata pri la tuta afero.

Pasis alia horo kaj duono. Finfine ili alvenis al malgranda aro da ĥatoj. Stefano malrapidigis la ĵipon, kaj ili rampis antaŭen ĝis la lasta. Maria nombris ilin. Staris dek ĥatoj tie, sed videblis

ankaŭ aliaj aroj iom pli for ĉe la bazo de la montetaro. Malrapide la familio pasis grupon de tri virinoj, kiuj laboris kune ĉe grandega pistujo, kiu sidis sur la grundo. Ĝi estis giganta ligna bovlo, farita el kavigita arbotrunko. Ĉiu virino havis pistilon, duoble pli longa ol la alteco de la virinoj. Unu virino sekvis alian je la tasko pulvorigi ion, kio estis en la bovlo, sed nun ili paŭzis dum minuto por rigardi la ĵipon kaj la novulojn en ĝi.

Maria sentis sin, kvazaŭ ŝi retroiris en la tempon. Tre ofte ŝi pensadis pri la nova vivo, kiu estas atendanta ilin, sed la realo nun lasis ŝin senvorta. Estis polvo kaj malpuro ĉie. Ĝi kovris la ĥatojn. Stefano jam plurfoje parolis pri unu-ĉambraj ĥatoj, sed iel ŝi neniam vere imagis, ke personoj fakte povus loĝi en io tiom malgranda. Tiam ŝi pensis pri si mem en tia loĝejeto, kaj poste pri sia tuta familio en unu el ili ! Sed Stefano diris, ke ni ne loĝos en ĥato, ŝi rememoris. Ili devis konstrui por ni domon, eĉ se li diris, ke ĝi malgrandus. Ho, Sinjoro ! Espereble dometo pli taŭgus por ni. Ĝi devas taŭgi.

Ŝi rigardis la virinojn ĉe la pistujo. Jam denove ili rekomencis sian laboron. Ili faras ian farunon, verŝajne, ŝi pensis. Ŝia menso kuris : ĉu ili scivolas pri ni ? Mi certas, ke malofte venas veturilo al tiu ĉi eta vilaĝo, sed post rapida ekvido ili apenaŭ

atentas nin. Ŝi rimarkis, ke unu el la virinoj portas sian bebon, volvitan kaj ligitan al la partrina dorso per multkolora ŝtofo. La kompatinda etaĵo alfrontis alidirekte de sia patrino. Ĝi aspektis kiel ia dorsosako kun etaj brakoj. Ŝajnis tamen, ke ĝi sufiĉe kontentis esti tie kun sia patrino.

Stefano haltigis la ĵipon kaj malfermis sian pordon. « Mi devas trovi Keĉagon. Li estas la ĉefo. Vi povas eliri, sed restu ĉe la aŭto, ĝis mi revenos. »

Maria forte volis kribi al sia edzo, diri al li, ke prefere ili iru ĉiuj kune. Sed ŝi decidis ne komplikigi ilian alvenon per trudemaj petoj, restis silenta, kaj rigardis sian edzon piediri al alia ĥataro iom pli proksima al la montetoj.

Post momento ŝia rigardo revenis al la virinoj laborantaj. Ŝi jam aŭdis multfoje la rakontojn de Stefano pri la vilaĝo kaj ties popolo, sed vere esti ĉi tie, meze de ĉio, entute malsamis. Strangaj ideoj komencis flosi tra ŝia menso : ĉi tiuj virinoj estos niaj najbaroj. Ŝi provis kompreni, kion signifus tio. Ŝajnis nereale. Ŝi aŭskultis la pum-pum-on de la pistiloj. Ŝia rigardo sekvis iliajn brakojn, dum ili levis la longegajn stangojn kaj tiam forte subenigis ilin denove. Pum. Unu el la virinoj ekkantis mallaŭte, kaj post momento la aliaj du komencis kunkanti kun ŝi. Maria aŭskutis ilian kanton. Ŝi ne

komprenis la vortojn, sed la muziko parolis al ŝi. Tio, kion ĝi diris, tristigis ŝin.

Ĉi tiuj estas realaj homoj nun, ne plu nekonatoj el foraj rakontoj de mia edzo. Kiel ni atingos ilin ? Ĉu ili volos lerni tion, kion ni venis por instrui ? Mi timas terure la ideon de du jaroj en tiu ĉi loko, sed ĉu du jaroj sufiĉos por konsciigi ilin pri la mesaĝo, kiun ni havas por ili ? « La bona novaĵo » ĝi nomiĝas. Ĉu ili taksos ĝin tiom bona ? Stefano ja pravis. Unue ni devos iom kompreni ilian kulturon. Sed kiel kompreni ? Ni apenaŭ scipovas ilian lingvon, kaj ni scias preskaŭ nenion pri vivo en vilaĝeto tia.

Ankaŭ Barbara silentis, dum ŝi konsideris proprajn pensojn. Nur Roĉjo ekscitiĝis kaj ŝajnis preta komenci la aventuron. Li elsaltis el la ĵipo. Ŝajnis, ke li intencas iri al la virinoj laborantaj pri la pistado, kiam lia patrino rememorigis lin pri tio, ke Paĉjo diris, ke ili restu ĉe la aŭto.

Roĉjo esprimis sian malkontenton per laŭta suspiro. Li sciis, ke io plia estigus ordonon, ke li restu en la ĵipo kun sia patrino. Tion li ne volis, do li decidis enketi pri la ĥato plej proksime de la ĵipo. Ĝi estis ortangula, pli-malpli, sed la anguloj estis iom rondigitaj. La muroj ŝajnis havi strukturon de fosto, sur kiuj estis ŝmirita ia helgriza argila stuko.

La tegmento estis farita el helbruna pajlo.

La ĥato ne havis fenestrojn, sed staris porda aperturo en la pli longa muro proksime de li. Pere de ĝi, li povis vidi iom de la interno de la ĥato. Ĝi havis nenian plankon krom la tero. Roĉjo povis vidi malmulton en ĝi, nur kelkajn argilajn potojn. Li volis enmeti sian kapon por pli bone rigardi, sed li sciis, ke tio estus malĝentila. Tamen li povis vidi, ke ankaŭ la alia muro de la ĥato havis pordan enirejon, samkiel tiu, tra kiu li observis. Unu sidis ekzakte kontraŭ la alia. Interese, li pensis, kaj li rapide kontrolis la aliajn ĥatojn. Ili ĉiuj tre similis la unuan. Bonege, li pensis, ili ĉiuj havas du truojn en siaj domoj.

« Jen interesa loko », li flustris.

Post nelonge Stefano revenis al la ĵipo. Kun li estis viro iom malalta kun helbruna haŭto kaj nigraj haroj, kiuj malsuprenpendis ĝis liaj ŝultroj. Seriozan mienon li havis, kaj iel evidentis, ke tiu ĉi viro estas la tribestro. Liaj profundaj brunaj okuloj rigardis fikse al Maria dum iom da tempo, poste al Barbara kaj fine al Roĉjo, kiu ankoraŭ estis esploranta ĉirkaŭ la ĥatoj proksime de la ĵipo. Ŝajnis al Maria, kvazaŭ li mense inspektus tiujn fremdulojn, kiuj venis kaj intencis vivi inter lia popolo. Ŝi provis legi lian vizaĝon por vidi, ĉu ilia

alveno malplaĉis al li, sed ŝi povis vidi nenian indicon pri ajna penso, kiun li eble havas malantaŭ tiuj malhelaj okuloj. Profunde en ŝi kreskis la duboj pri ilia misia laboro en tiu ĉi loko.

Li surhavis mallongan ĝinzon, la unuan civilizaĵon en la vilaĝo laŭ la okuloj de Maria. Tamen li portis sur si nek ĉemizon nek ŝuojn, kaj pro lia duonnudeco, ŝi tuj forgesis la drelikan ŝorton. Frapis ŝin forte tio, ke tiu ĉi viro estis indiĝeno. De malantaŭe je pluraj paŝoj knabineto sekvis ilin. Ŝi estis vestita samkiel la virinoj laborantaj ĉe la pistujego, per ia volvaĵo el multkolora ŝtofo. Ŝi aspektis pli-malpli okjaraĝa kaj havis longajn nigrajn harojn, kunigitajn en dikan plektaĵon.

Maria eliris el la ĵipo kaj diris al Barbara, ke ŝi faru same. Ŝi ridetis laŭeble varme, etendis sian manon kaj diris : « Saluton. Mi nomiĝas Maria Whitley. » La viro rerigardis al ŝi, sed lia vizaĝo montris nenian ŝanĝon. Tuj ŝi konstatis, ke li ne komprenis ŝin. Ŝi ridetis denove kaj reprovigis kun granda malfacileco en la Taŭakla, « Eh, Maria Whitley... *mido...jada.* »

« *Mot'ji, ko Keĉago mido jadaa,* » li respondis al Maria tiom rapide, ke ŝi apenaŭ komprenis la unuan vorton. Eĉ se tiu ĉi estis ekzakte la speco de dialogo kiun ŝi jam studis kun sia edzo. La cetero

de tio, kion diris la viro, restis terura sensencaĵo. *Mot'ji* signifis *bone* aŭ *bona*. Ŝi certis pri tio, preskaŭ.

Kiam ŝia menso fine decidis rezigni pri lia respondo, Maria konstatis, ke la viro ne faras sian parton de la manpremo. Strange, li ne premis ŝian manon, sed nur suprenlevis iom sian propran duone pugnigitan manon. Ŝi tute ne certis, kion fari. Eble li iel intencis oferti sian manon por manpremo, sed ŝi ne povis preni ĝin, dum ĝi estis kunpremita tiel. Finfine ŝi provis laŭeble fari manpremecan agon kaj rapide prenis lian pojnnon kaj skuetis ĝin. Tiam ŝi suprenrigardis al lia vizaĝo, serĉante senespere por ajna indico, ke ŝi faris ĝuste. Nenion. Estis nur tiu sama, tro serioza mieno, kiun ŝi vidis, dum li piediris al la aŭto kun ŝia edzo.

Stefano vokis al Roĉjo por revenigi lin al la ĵipo kaj prezentis lin kaj Barbaran al Keĉago. Maria aŭskultis, kiam ŝia edzo parolis al la viro, Keĉago, en ties lingvo. Ŝi apenaŭ povis kredi, ke Stefano povas fakte komuniki kun li. Memevidente li devas ankoraŭ iom ekzerci sin al la lingvo, ŝi pensis, sed almenaŭ li povas paroli kun li. Kiom malfacile estis por mi nur diri al li mian nomon. Terure ! Kara Sinjoro, vere malplaĉas al mi diri tion ĉi, sed eble mi ja devis studi iom pli diligente antaŭ ol fari tiun

ĉi vojaĝon.

« Ni iros nun al nia domo. Ĉu vi povas sekvi nin en la aŭto kun la infanoj ? » demandis Stefano.

« Kio ? », Maria respondis senspire. « Ho, jes, kompreneble. » Subite ŝajnis al ŝi, ke ĉio okazis treege rapide. La domo, ŝi pensis. Ni iras nun al la domo. Ni iras al nia nova vivo. Ŝi sentis sin nervoza. Ŝi eksentis sin svenema.

Dum longa momento ŝi pensis pri siaj infanoj vivantaj en tiu ĉi loko. La infanoj ! Ŝi malfermis sian buŝon por voki al ili kaj diri, ke ili eniru la aŭton, sed konstatis subite, ke ili jam enas kaj atendas ŝin. Ŝi mem eniris kaj startigis la ĵipon. Stefano kaj Keĉago estis piedirintaj iun distancon, jam preterpasis la tieajn ĥatojn, kaj ekproksimiĝis al malgranda konstruaĵo, ĉirkaŭ kiu estis malalta barilo. Iom malantaŭ ili daŭre sekvis la eta knabino en la multkolora volvaĵo.

Maria rigardis la konstruaĵon. Ĝi malgrandis, sed ĝi estis vera domo, ne ĥato. La tereno ene de la barilo entenis sekan dezertan sablon anstataŭ verdan kaj hejmecan gazonon, sed la domo ne aspektis tro malnormala. Maria ne povis kompreni, kial ĝi nervozigas ŝin, kial ĝi donas al ŝi mornan senton. Ŝi pensis, tio devas esti nia hejmo.

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

Sabato 29-a de marto 2014	Acerejo apud Trivero (detaloj en la retejo: esperanto.qc.ca)
Vendredo 11-a de aprilo 2014, 18 h*	Resto Végo (sube)
Vendredo 25-a de aprilo 2014, 19:30 h	MEDO
Vendredo 9-a de majo 2014, 18 h*	Resto Végo (sube)
MEKARO: 17-19-a de majo 2014	Ŝerbruko (www.mekaro.ca)
Vendredo 30-a de majo 2014, 19:30 h	MEDO
Vendredo 13-a de junio 2014, 18 h*	Resto Végo (sube)
Julio-aŭgusto: ferioj	
Vendredo 12-a de septembro 2014, 18 h*	Resto Végo (sube)
Vendredo 26-a de septembro 2014, 18 h*	Itala manĝo en MEDO (alportu ion!) kaj jarkunsido de ESK
ARE: 10-13-a de oktobro 2014	Silver Bay, New York
Vendredo 31-a de oktobro 2014, 19:30 h	MEDO
Vendredo 14-a de novembro 2014, 18 h*	Resto Végo (sube)
Vendredo 28-a de novembro 2014, 19:30 h	MEDO
Sabato 13-a de decembro 2014, 18 h*	Jarfina festo kaj LASTA kunveno en MEDO ! Alportu ion ! Anoncu vin al normandfleury@esperanto.qc.ca

* Noto : manĝo je la 18 h , babilado ekde 19:30 h. Por temaj vesperoj kun manĝoj vi povas alporti ion kaj veni je la 18 h aŭ vi povas veni simple por babili je la 19:30 h.

Resto Végo St-Denis (restaurant végétarien) : 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »).
MEDO (Montreala Esperanto-Domo) : 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

Esperanto-renkontiĝoj

17-19-a de majo 2014 : 11-a MEKARO

Sherbrooke, Kebekio

30-a de junio — 7-a de julio 2014 : NASK

Viktorio, Kanado

julio 2014 (*detaloj: esperanto-usa.org*) : usona/kanada landa kongreso

Viktorio, Kanado

18-25-a de julio 2014 : 70-a IJK

Fortaleza, Brazilo

26-a de julio — 2-a de aŭgusto 2014: UK

Bonaero, Argentino

16-18-a de majo 2015: 12-a MEKARO

Toronto, Ontario

25-a de Julio — 1-a de aŭgusto 2015 : 100-a UK

Lille, Francio

21-23-a de majo 2016: 13-a MEKARO

Granby, Kebekio

provizore: 15-a MEKARO (2018) : Montrealo (Kebekio)

Montrealaj esperantistoj : la jaro 1966 (maldekstre) kaj 1971 (dekstre)
el persona arkivo de Onil Perrier (elkoran dankon, Onil)



Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko : Yevgeniya Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair, Francisko Lorrain kaj Joel Amis. **Estraranoj de ESK** : Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Nicolas Viau (konsilanto), Joel Amis (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair et François Lorrain et Joel Amis. **Administrateurs de la SQE** : Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Nicolas Viau (conseiller), Joel Amis (conseiller).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2014.05.20

6358, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca



En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca



Vizitu nian retejon !

Visitez notre site web !

www.esperanto.qc.ca



Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :
www.pasportaservo.org.
Vi povas ankaŭ kontakti
Ĵenja-n Amis
(yevgeniya.amis(ĉe)gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

